# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://www.satesperanto.org/ *** retadreso: satesperanto@free.fr



Cezanne : Kamparano

Novembro 2006 77-a jaro, n-ro 11 (1217)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# En la Serba Gazeto "Politika"

de la 6-a de septembro 2006
estas eta artikolo pri la 79-a SAT-Kongreso



Среда 6. септембар 2006.

## Светски конгрес есперантиста у Београду

Радујемо се јер смо опет срели, на 79. светском конгресу есперантиста организације SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) од 19. до 26. августа 2006. године у Београду, хрватског пријатеља есперантисту. Ми се са њим дописујемо већ три године. Тема нашег дописивања су противпешадијске мине против особа. Прво нас је хрватски есперантиста обавестио о минским пољима у својој земљи, и ми смо редиговали са њим, на есперанту, документ на француском језику о елиминисању мина у Хрватској. Помоћу тог документа наш пријатељ француски посланик г. Франсоа Рошблуан (Franзois Rochebloine) посредовао је у француској Националној комисији за уништавање противпешадијских мина (CNEMA) у току 2003. и 2004. године. Његова интервенција је омогућила да француска влада одреди извесну суму за разминирање у Хрватској.

За време нашег недавног сусрета у Београду говорили смо о овоме, али смо ми указали на наша сазнања о новом послу повезаном машине за разминирање.

Ми смо то чинили и радимо захваљујући есперанту, језику мира.

**Colette Weiss/Andrй Weiss**
**чланови SAT-а**
**Др Прибислав Б. Маринковић**
Београд

Merkredo 6. septembro 2006

## Monda kongreso de esperantistoj en Beogrado

Ni ĝojas ĉar ni denove renkontis en la 79-a Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) de la 19-a ĝis la 26-a aŭgusto en Beogrado, kroatan samideanon. Ni korespondas kun li jam de tri jaroj. La temo de nia korespondado estas la kontraŭpersonaj minoj. Komence, la kroata samideano informis nin pri la poluitaj zonoj pro minoj en sia lando, kaj ni redaktis kun li esperant- kaj franclingvan dokumenton pri la senminigo en Kroatio. Per tiu dokumento nia amiko, la franca deputito S-ro François Rochebloine (Francisko Roŝbluan), intervenis en la franca Nacia Komisiono por la elimino de Kontraŭpersonaj Minoj (CNEMA) dum la jaroj 2003 kaj 2004. Liaj intervenoj ebligis, ke la franca registaro asignu sumojn por la senminigo en Kroatio.

Dum nia freŝdata renkontiĝo en Beogrado oni parolis pri tio ĉi, sed ankaŭ ni aktualigis niajn informojn pri nova ago rilate maŝinon por senminigo.

Ni faris kaj ni faras tion ĉi dank'al Esperanto, lingvo de Paco.

Colette Weiss/André Weiss
Membroj de SAT

Serbigis por "Politika":
Dr. Pribislav B. Marinković
Beogrado

**Agadu kadre de SAT kaj subtenu la Pacagadon ! Skribu al viaj deputitoj kiuj subskribis la du Proponojn de Rezolucio pri kontraŭpersonaj minoj por subteni ilin!**

(Vidu junian Sennaciulon, p. 83-84)

# Renkontiĝo en Seulo



*Du perantoj : Korea kaj aŭstralia*

Antaŭ ol forlasi Koreujon, mi sukcesis renkonti la esperantistojn de la grupo "Solidareco kun Paca Movado", kiu kreiĝis sur-strate antaŭ du jaroj okaze de manifestacioj por paco kaj regule eldonas, malgraŭ la, inter aliaj, lingvaj malfacilaĵoj, monatan re-tan revuon « Solidareco ».

La grupo renkontiĝas dimanĉon posttagmeze ĉiun duan monaton. Ĉi-foje renkontiĝo okazis en la Paca Muzeo, situanta proksime de Insadong, bone konata kvartalo de ĉiuj turistoj pro ĝiaj allogaj butikoj kaj koncertoj.




Ĉeestis dek du homoj, inkluzive de Bernie Heinze kaj mi, ĉu SAT-anoj, ĉu pacaktivuloj. Se mi aldonas ke kelkaj vojaĝas ĝis tricent kilometroj per rapida buso kaj, kiel Vera, ne povas iri ien ajn sen PIV, vi tuj konscios pri la entuziasmo de la membroj de tiu grupo. La fakto ke plejparto el ili havis unuan oportunon vid-al-vide paroli kun SAT-anoj, kaŭzis grandan ĝojon, ne nur al Choi Man Won kaj Bernie Heinze, la du SAT perantoj.

La kunveno komenciĝis per rapida sinprezentado kaj diskuto pri SAT, aludo pri la timo membriĝi al SAT pro lingva problemo. La statuto ja postulas de la membroj bonan konon de Esperanto. Sekvis demandoj pri SAT en Aŭstralio, komparoj inter la vivkondiĉoj en tiuj du landoj, peto de informoj pri la medio en Aŭstralio, debato pri la plej taŭga formo de registaro : ĉu komunismo, ĉu socialismo, ĉu anarkiismo ?

La projekto eldoni la libron « Ĉu ili diras al ni la veron ? » tute evidente estis jam diskutita de la grupo. Ili donis sian unuaniman vidpunkton ke estas pli bone rezigni pri tiu eldonado por ne helpi la propagandon de Usono, kiel mi ja raportis okaze de la kongreso en Beogrado.

Rimarkindaj estis la fotoj sur la muroj de la ĉambro, kiuj montras la loĝlokojn de koreaj familioj en Japanujo. Temas pri Utoro, ĉirkaŭurbo de Kioto, kie daŭre loĝas la posteuloj de koreoj senditaj en Japanion por labori kontraŭ ege malalta pago dum la japana imperio de 1910 ĝis 1945. Nun la registaro deziras translokigi ilin por konstrui belajn kaj modernajn domojn sur la tereno.Tiuj homoj batalas por savi siajn domojn ĉar ili ne havas la financajn rimedojn por vivi en alia loko.

La renkontiĝo finiĝis en restoracio en gaja etoso.

*Franciska Toubale .*

## El la redaktejo...



Karaj,
la tempo rapide pasas kaj ni alproksimiĝas al la fino de la jaro. Venonta jaro devus alporti grandajn ŝanĝojn en la vivo de nia Asocio, kaj ili povos realiĝi nur per via helpo. Ĉu vi jam respondis al la Referendumo? Anoncu vin por partopreno en la nova redakta skipo kaj aktive partoprenu per artikoloj al la nova Sennaciulo (vidu la apudan artikolon).
Ni havas ankaŭ plian bonan novaĵon. Venontjara SAT-kongreso okazos en Parizo (Pariza regiono), de la 21.07.-28.07.2007. Pli da informoj vi trovos en la retpaĝoj de SAT (http://www.satesperanto.org/) kaj en la venonta(j) Sennaciulo(j). Bonvolu jam nun reklami pri ĝi ĉe viaj konatoj. Ĝi estos relative malmultekosta (por riĉa kapitalista lando kiu estas Francio), kaj ni esperu ke multaj inter vi partoprenos en tiu kongreso.
Fine de mia mallonga redakcia mesaĝo, mi denove invitas vin sendi materialon por nia gazeto. Jam por la decembra numero ĝi mankas. Dankon!

*Via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Moĉilnik kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

❐

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Kiel vi povis legi en la oktobra Sennaciulo, formiĝas nova skipo kiu estonte redaktos novan pli modernan kaj pli maldekstran Sennaciulon. Ĝi devus aperi ĉiun duan monaton kun duobla nombro da paĝoj. Ĉiu numero devus enhavi specialan teman dosieron. Cirilo Orsingher faras proponon ĉi sube pri tiu nova labormaniero kaj aperritmo.
Viajn eventualajn rimarkojn vi povas sendi al la SAT-sidejo per ordinara aŭ per elektronika poŝto. Ni peros ilin al la nova skipo.

La redakcio

# Dumonata Sennaciulo

Dumonata apero de la ĉefa organo de SAT laŭ preciza kalendaro:

Januaro/ Februaro
Marto/ Aprilo
Majo/ junio
Julio/ Aŭgusto
Septembro/ Oktobro
Novembro/ Decembro

Entute 6 numeroj. Ĉiufoje nova ĉefredaktoro kies kompetentoj respondas al la 6 jenaj temoj, kiuj sekvos la ĉisupran kalendaron, ĉiujare.

**Vivo de la homoj:** homaj kaj infanaj rajtoj, feminismo, pedagogio, ĉiutaga vivo,...

**Minoritatoj:** etnaj, seksaj, kulturaj aŭ lingvaj minoritatoj, rajtoj de la minoritatoj, krimoj kontraŭ...

**Scienco kaj sano:** biologio, ekologio, ekonomio, sociologio, medicino,...

**Paco:** humanistaj filozofioj, konkretaj agoj, historio de la senperfortaj luktoj,...

**Laboro kaj teknikoj:** sociologio de la laboro, rajtoj de la laboristoj, alternativoj, sindikatismo, metioj, profesia kulturo,...

**Kulturo kaj komunikado:** historio, plastikaj artoj, literaturo,... kaj Esperanto, amaskomunikiloj, ekstermovadaj asocioj,...

Konkrete, oni publikigos tiun kalendaron de la aperoj en S-ulo kelkajn monatojn antaŭe, se necesas komenci la novan organizon. Oni tiel povos arigi dokumentojn kaj instigi la membrojn partopreni. Tio ne devas esti tro rigora. La ĉefa temo okupos, ekzemple, nur la duonon de ĉiu numero. La aliaj paĝoj restas liberaj por la kutimaj rubrikoj kaj la precizaj aŭ neprokrasteblaj informoj. Persone (por proponi ekzemplon), en ĉiu numero, mi aŭ kamarad(in)o publikigos prikulturan artikolon laŭeble akordigitan kun la ĉefa temo sed mi invitos ĉiujn pli vigle kaj intense partopreni en speciala numero kaj plie riĉigi nian kulturan heredaĵon.

Cirilo